



Informoj:
Arto :- Literaturo
Turismo :- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakejo:
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

LA MAJSTRO

Vivi la 15ⁿ tagon de decembro kaj ne rememori la saman daton de la jaro 1859 estas io malfacila por la esperantistoj ĉar tiam ni ĉiuj naskiĝis kiam naskiĝis Dro Zamenhof elpensinto de Esperanto.

Elpensinto... ĉu tiu vorto ne estas iom stranga? Por elpensi ion estas necese ke tiu «io» ne ekzistu... kaj nia dua lingvo, ĉu ne ekzistis ĉiam? La verko de D-ro Zamenhof ne estas artifikajo; estas vivaĵo ĉar li prenis pecojn da vivo, kunigis ilin kaj faris la belajon kiun ni amegas. Ni, do, povas nomi lin farinto? Ankaŭ ne. Faranto nur faras sed ne genie, arte, kaj la zamenhofa laboro estas plene genia, tute arta kaj tie estas ĝia plej granda merito... Plie, tiu laboro havas du facetojn unu filologian, alian homaraman kaj mi opinias ke ja estas malfacile scii kiu el ambaŭ estas la unua.

D-ro Zamenhof estis kuracisto. Li penis sanigi la homaron de granda sufero: la diversaj lingvoj.

Li prenis plumon kaj receptis. La recepto estis Esperanto. La malsanulo, kiel ĉiuj malsanuloj, iafoje trinkas la kuracigilon kaj saniĝas; ĉi tiuj estas ni. Aliffoje li ne trinkas ĝin kaj daŭras la malsano; tiuj estas la indiferentuloj. Kaj fine, ekzistas ankaŭ malsanuloj kiuj kontraŭfaras kaj pli malsaniĝas: tiuj estas la idistoj, orientalistoj, ktp.

Ekzistas multaj kiuj estis esperantistoj... plej bone dirite: kiuj sin pensis esperantistoj, sed tial ke la tempo pasas kaj ili vidis ke Esperanto estas ne parolata de ĉiuj kaj neniun profiton atingis, ili laciĝis kaj ekesperantiĝis. Al tiuj ĉi, ni devas adiaŭi. Eble estus plej bone ke ili ne estu venintaj al ni.

Tio, kio malmulte kostas, malmulte estas amata; Religioj bataladis multajn centjarojn; por ili mortis multaj miloj da homoj kaj sendube pro tio ili daŭradas.

Nia ideo estas kvazaŭ religio; ni, do, devas deziregi bataladon por ĝi; suferi pro ĝi, ĉar tiel ĝi estos forte starigata.

Virino plej amas en la mondo sian filon ĉar ŝi, antaŭ ol naski, multe suferis pro la nova etulo.

Esperanto estas nia filo. Penu por ĝi, por ke ĝi kresku, por ke ĝi estu plenaĝulo forta kaj tiam

ĝi estos patro de granda familio kaj liaj filoj sin amos kiel veraj fratoj, kaj estos atingita la celon kiun Zamenhof sopiris pere de la genia lingvo Esperanto kies li estis... Ĉu elpensinto?, ĉu farinto?, ĉu kreinto?, mi ne scias. Nu nomu lin nur MAJSTRO sed kun grandaj literoj, ĉar tia estas lia nomo. MAJSTRO: en tiu ĉi dato niaj koroj iras al vi cielen!!!

J. ORÓS.

15 decembro 1931.

--- KASITA AMO ---

Mi fajrajn amleterojn plej ofte ricevadis
De ia nekonata kaprica ĉarmulin',
Mi estis ŝin trovinta ĉe bal' en karnavalo,
Masketo sur vizaĝo ne lasis vidi ŝin.

Ŝi montris en leteroj al mi frenezan amon,
Ŝi nomis min karulo kaj viv' de sia kor',
Per vortoj ŝerce spritaj ŝi mokis miajn petojn
Kaj restis netrafebla por mia blind-fervor'.

Ho, kiu povis esti ja tiu kaŝulino?
Maljuna nur virino sen hont', kiel ĝendarm',
Kredeble junvidvino pri nova edz' revanta,
Aŭ bela fraŭlineto ravonta min per ĉarm'?

Demandoj nesolveblaj. Mistero plej obstina
Ĉirkaŭis ŝin kaj vane ne lasis min esper',
Mi penis ĉiel trovi aŭ vidi l' amatinon
Kaj ĉiujn miajn provojn sekvadis malprosper'.

De tag' al tag' pli ĉarmaj fariĝis la leteroj,
Ŝi havis la lertecon per plumo ravi min.
Nur unu tagon mankis al mi ŝia letero,
Terura por mi estis, malĝoja tag' sen fin'!

En celo ŝin ekkapti mi trovis artifikon,
Sekrete mi ĝin uzis kun ruz' de Lucifer',
Ŝi tuj divenis ĉion, kaj belan kaptileton
Rapidis al mi sendi en nova mokleter'.

Sen pov' elporti plue, mi venis al amiko,
Rakontis al li ĉion kaj petis pri konsil'.
Tre sperta pri virinoj, proponis li min helpi,
Kredante, ke l' sekreton li trafos kun facil'.

Li estis oficisto de la poŝtejo urba,
Plej lerte li spionis kaj venis al sukces',
Li skribis al mi baldaŭ dirante, ke li konas
La strangan heroinon de mia am' sen ĉes'.

Kun koro ĝojebria mi kuris al la amiko,
Freneza pro deziro mi tuj demandis lin.
Kaj ho terura sorto! La ĉarma kaŝulino...
Nur estis mia juna mokanta min fratin'!...

Originale verkis,
VICENTE INGLADA.

NE PLU LATINLINGVO, SED ESPERANTO

Iu el la plej neutilaj kaj ĝenaj lernadoj, kiun ni estas nepre devigataj fari de la praavaj tempoj en la liceoj de nia lando, estas nedubeble tiu de la latina lingvo. De kiam la respubliko anstataŭis la monarĥion, multajn aferojn oni ŝanĝis en Hispanujo, multaj aliaj estis renversataj, sed tamen, la latinlingva lernado daŭris en la mezgrada instruado, kiel se ĝi estus grava, taŭga, eĉ necesega afero kiun ni devus netuŝi, aŭ kiel iu sentimentala forto pelus nin al ĝi.

Ni vidu do la praktikajn aŭ moralajn rezonojn, kiuj povus pravigi la daŭrigadon de tiu anakronismo, kiu tamen devigas cerbumi senfrukte kaj kaŭzas tempoperdon al nia junularo, kvazaŭ ambaŭ aferoj ne povus esti uzataj nuntempe por pli bezonataj studadoj.

Ni dezirus scii al kiu utilas la kono de tiu klasika lingvo, esceptinte kompreneble la pastrojn, profesorojn de tiu lingvo kaj tiujn kiuj profesie esploras la romanon juron, historion aŭ literaturon t. e.: kiuj ĝuste akiras siajn tute specialajn konojn, ne en liceo, sed en seminario aŭ universitato.

Oni asertas ofte, ke latinlingva scio multe helpas koni la hispanan ortografion. Ni eĉ ne dubas ke, se ne multe, almenaŭ iomete ĝi helpas, same kiel ankaŭ la arablingva kaj la greka, tamen tiu utileto, kiu, kiel ni ĵus diris, ne estas ekskluziva de ĝi, certe ne pravigas ĝian truditan lernadon. Jen kial:

Pri la uzado de la b kaj la v, kelkfoje estas neniu alia honcerna regulo ekster la latindeveno de ĵa vorto; t. e.: kaj ni atentu bone, ke ni devas unue memori, ĉu la latina vorto estas skribata per b aŭ per v, malgraŭ kio multajn fojojn tio ne sufiĉas, ĉar la hispana ortografio ne ĉiam obeas sian devenvorton; ekzemple: abogado, avilés, maravilla, respektive devenantaj de advokato, abulensi kaj marabilia. Same okazas pri la uzado de h, rilate al kio latinlingvo liberigas nenan certecon; ekzemple: España, huevo, hueco, huérfano, hueso, kiujn oni devus laŭdevene skribi, la unuan per h ĉe ĝia komenco, kaj sen tiu litero la ceterajn. Ni vidas do, ke ne nur estas nepre necese antaŭscii la latinan ortografion, sed ankaŭ, ke ĝia penplena studado ofte taŭgas por nenio. Nu, por lerni nian hispanan ortografion, ĉu ne estas multe pli facile kaj efike, rekte studi ĝin anstataŭ, unue la latinan por poste la nian?

Jen la tuta utilo de la latinlingva scio, vera malgravaĵo; kaj tio ĵa, rilate al afero kiel la ortografio, kiu devus laŭlogike tute malaperi; ĉar ni devus skribi fonetike, tial ke ni tre bone nin reci-

proke komprenas parole, kaj sekve sen ortografio, kio pruvas ke ĉi tiu estas skribe nenecesa.

Kaj tamen, por la lernado de tiu nelogika, mortinta lingvo, iu certe el plej malfacilaj kaj tedaj, niaj knaboj devas eluzi multajn horojn, por nepre forgesi poste ĉion, kaŭze de neuzado en la praktika vivo kaj de klara, kompleta neutilo en preskaŭ ĉiuj profesioj.

Eble ni povus pensi, ke se ĝi ne liveras materialan profiton, almenaŭ iu sentimentala kialo, iu kvazaŭ dankemo, kvazaŭ filamo, puŝas nin al tiu perdotempo. Oni diras: latina lingvo estas ĵa la patrino de la hispana. Jes, certe; sed ankaŭ estas certe, ke ĝi estas la lingvo de popolo kiu neniam fariĝis fama pro siaj sciencoj nek artoj, sed nur pro sia raba kaj tirana spirito, kaj kiu dum multaj jarcentoj despote superregis nian patrolandon.

Tute kontraŭe Esperanto, kiu eĉ nun jam utilas, ne nur por amuziĝi korespondante kun fremduloj aŭ kolektante poŝmarkojn kaj poŝkartojn, sed ankaŭ por komercaj, sciencaj aŭ sociaj aferoj, pri kiuj la estonteco estas nedubeble tute sia, ne estas ankoraŭ akceptata en la oficiala instruado, malgraŭ ĝia granda efiko, facileco kaj allogo, devenanta de tio ke, krom sia belsoneco, plaĉas al ĉiuj pro la manko de esceptoj. La plena utilo de Esperanto dependas nur de tio ke inertforto estu venkata, kiel okazis al metra decimala sistemo. Logika rezono estas neniu kontraŭ ĝi.

Alia gravega profito, kiun nia kara lingvo donas al ni de la instrua vidpunkto, estas ke ĝi konigas nin la gramatikon; sed ne la hispanan, francan, anglan aŭ iun ajn nacian gramatikon, konfuzaj miksaĵoj de logikaj kaj nelogikaj reguloj supersutataj per amaso da esceptoj, kiuj malpermesas malkovri la lingvan strukturon, la mekanismon per kiu la homoj esprimas siajn pensojn, sed la ĝeneralan gramatikon, tiun kiu plezurigas la spiriton tiun kiu tiuj vidigas nin la skeleton la konsiston, la funkciadon de ĉiu ajn lingvo, kaj mirinde pretigas nin por lerni konscie alian nacian, aŭ la hispanan mem. Ankaŭ Esperanto vekas potence nian scivolon pri la fremdaj geografio kaj historio, kiuj nuntempe estas tiel necesaj al ĉiu klera persono.

Estas espereble ke la nova registaro kaj parlamento aranĝos la publikan instruadon kaj montros sian progresemon kaj deziron forlasi rutinaĵojn, metante devige en la mezgrada lernado Esperanton anstataŭ latinlingvo. Ili tute devas neatenti, pri tio ĉu ankoraŭ aliaj nacioj ne decidigis fari tiun radikalajn, sed neniel danĝeran ŝanĝon, ĉar ni, hispanoj, ĵa ne bezonas imiti simie la erarojn de la aliaj, kaj por ni prezentigas belega okazo, en ĉi tiu nova strukturado de la regno, por fari tion kaj atingi la vicon de la popoloj kiuj unue akceptis oficiale tiun mirindan

kaj efikan ilon por la interkompreno, paco kaj amo de la homaro.

Niaj tri esperantistaj deputitoj kaj la multaj aliaj kiuj simpatias al nia tutmonda lingvo, certe klopodos sukcesigi tiun deziron, komunan al ĉiuj disĉiploj de Zamenhof.

RAMÓN DE SALAS.

TRA LA MONTJOJ

La lasta esperantisto

Hispana Pirineo apud la franca limo. Domaro ĉirkaŭ la sanigaj fontanoj. Hoteloj, vendejoj, kazino, sportkampoj... ĉio kion bezonas homaro por kompliki la vivon. Sed ĉio beligas la scenejon, la altajn montojn.

En la malgranda vendejo fraŭlino atendas la eblajn aĉetantojn kun la manojn en virina laboreto kaj la penso en alia loko, virina laboreto ankaŭ.

Fremdaj vortoj kaj gajaj ridejoj vekigas Fraŭlino vidas en la ĝardenoj proksime al sia vendejo ĝis kvin francajn skoltojn kiu parolas laŭte kaj mokas pri la sesa knabo kiu portas sur sia vesto verdan stelon. Fraŭlino bone komprenas kion unu el ili diras al la verdastelamanto:

—Vi, lasta esperantisto, se ni povos aĉeti poŝtkarton kun via esperanta helpo, ni farus tuj ankaŭ esperantistojn. Sed vi devas paroli en la vendejo nek hispane nek france, nur esperante. Eble ni ridos tre multe.

Fraŭlino karesas alian verdan stelon sur ŝia kitelo, kaj murmuretas ridetante: —Eble estas certa konata frazo; kiu ridos laste, ridos tre laŭte.

Knaboj malfermas pardon kaj penetras en la malgrandan vendejon.

—Bo... bonan tagon — malkuraĝe diras «la lasta esperantisto».

—Bonan tagon, skoltratoj. Kiel mi povas helpi al vi?

Dum kelkaj minutoj nur oni povas vidi sep malfermitajn buŝojn, ses per la miro kaj la alian per la rideto. Fine sonas laŭtege franca voko:

—Vivu la lasta esperantisto!! — Sed la ruĝa knabo de la verda stelo korektas: —Ne, ne. Vivu: la unua esperantistino!!

«Nek hispane nek france» diris skolto kaj fraŭlino nur volas paroli esperante, kaj la antaŭe malestimata verdastelamanto tradukas al la aliaj ŝiajn frazojn.

Kiam ili aĉetis ilustritajn poŝtkartojn pri Jaca, la knabo kiu unue plej mokis pri la lasta esperantisto diris kiel adiaŭo:

—Antaŭe ni ĉiam mokis pri nia amiko pro lia verda stelo. Nun ni komprenas ke esperanto estas utila kaj bela. Ni lernos esperanton tuj kiam ni

reiros hejmen kaj laboros senĉese por pligrandigi la amon al la verda stelo.

Kaj ili daŭrigas sian vojaĝon tra la montoj.

Post semajno penetris en la malgrandan vendejon la loka leterportisto dirante al la fraŭlino:

Ni alportas francan poŝtkarton kun nekomprenebla adreso. Mi pensis eble ĝi estos por vi, tial ke vi portas verdan stelon egalan al tiu kiun vi ĉiam kunportas.

Fraŭlino rigardas nekomprenebla adreson kaj tre bone komprenas. La bildo estas adresita: «Al la unua esperantistino, poŝtkartvendejo». Kaj diras tiel: —Tiu ĉi nokton ĉirkaŭ la skolta flambrulajo mi havas kvin esperantajn lernantojn. Ĉiuj ses sendas al vi skoltratajn salutojn. —Kaj por subskribo «La lasta esperantisto».

Verkita de

RALIP SALLUMART.



INDIFERENTECO POR ESPERANTO



Kiam mi ĝoje rigardadas la nunan apogeon de nia movado kies plensukcesa estonteco sin prezentas jam tute videbla, mi nepre meditas pri la mirinda persisteco ĉe la diverslanda apostolaro kiu enkondukis, klarigis kaj defendis ĉie la ideon de Zamenhof. Senfrukta estus estinta la elpenso de la Majstro sen tiuj homoj kiuj ne laciĝantaj trapasis la grandan barilon kiu obstrukciis la vojon, tio estas la indiferenteco. Ĉar mi opinias ke ĝia detruo estis la plej grava tasko kiam tia fenomeno estis ĝenerala, tial mi dediĉas korajn laŭdojn al la pioniroj de Esperanto.

Indiferenteco por Esperanto estis kvazaŭ epidemio de stranga malsano kies simptomoj estas: mensa atrofio, surdeca manio, kaj elmontrita neebleco por ŝanĝi nescian rideton je saĝa mieno. Dank' al la efika kuracila scienco disvastigata de tiel meritindaj apostoloj, oni jam povas diri ke malaperis la epidemia karaktero, kvankam restas ankoraŭ en la mondo multenombraj malsanuloj.

En la indiferenteco mi ne kalkulas, kompreneble, la kontraŭulojn kaj malamikojn kiuj meritas apartan atenton, ankaŭ ne tiujn kiuj ankoraŭ ne aŭdis pri Esperanto, sed nur tiujn kiuj konas la ideon kaj restas indiferentaj kaj tiujn kiuj ĝin ne konas, kaj tamen antaŭjuĝas ĝin kaj la esperantistaron kiel strangajoj. Inter la lastenomitaj ekzistas raportindaj ekzempleroj.

Antaŭ nelonge mi estis promenanta kun klera homo kiu min delonge konis. Li rimarkis mian verdan stelon kaj demandante pri tiu insigno hazarde preterpasis apude esperantisto kiu diris al mi «adiaŭ» kaj al kiu mi respondis per la sama vorto. «Kion vi diras» demandis min mia akompananto, «ĉu vi ne komprenis sinjoro? mi adiaŭis per esperanta lingvo» mi respondis al li, kaj tiam

li subite haltis ekkriante kun miro «ho! ĉu vi estas esperantisto?» kaj mia jesa respondo estis rapida ĉar ĉe lia voĉlaŭta demando mi imagis vidi Esperantan emon. Nu, do mi eraris. Mi tion komprenis vidante liajn okulojn senmovajn kvazaŭ li serĉus en lia menso ian okazintaĵon aŭ nerimarkitan tialon per kiuj li jam devus esti suspektinta mian strangan proprecon. Sendube ke li ne trovis ion suspektindan ĉar rekomencis la iradon dirante nur «ĝis nun mi neniam vidis esperantiston.» Mi tiam dubis pri lia klereco kaj akiris la certecon de lia malsano... sed kun la tri nomitaj simptomoj.

Post rompo de la barilo de l' indiferenteco tiuj izolitaj malsanuloj estas nur kompatindaj, kaj neniel malhelpas nian movadon des pli grandigantan ju pli tiuj malsaĝuloj akcentas sian necian rideton.

F. TURRIO N.

:-: :-: Ĉ U E B L E ? :-: :-:

Oni scias ke Esperanto ankaŭ enhavas spiritan malamikon vizitantan nin senĉese por semi kiel eble malkonsenton inter la pacaj batalantoj.

Ian nokton mi legadis miajn esperantaj gazetojn kaj subite aperis antaŭ miaj okuloj vizio al kiu mi timeme demandis kial ĝi vizitas humilan esperantiston. Ĝi respondis, ke malofte ĝi tion faras kvankam profiton preskaŭ ne eltiras el la humiluloj, mi plej efike agadas malbonaĵojn inter kleraj homoj ĉar ĉi tiuj plej facile elpensas argumentojn por kontraŭbatali unu la alian, kaj tiamaniere, mi, abomenulo, kiel vi min nomos, ĝuas la plej gajajn horojn ĉar mi konstante pensas veneni la homajn korojn. Ĉiam laŭ mia povo mi penas vin dividi por ke vi neniam povu min venki, kaj ĝis nun iom post iom mi atingas mian celon.

La vizio ĵusdirinte pretiĝis forkuri.

¡Haltu fantomo! atentu por min aŭdi:

Vi eraras, vi ne rimarkas ke la esperantistoj konas vin, kaj pro tio ili sin arigas por vin estingi, ili lasos flanke iliajn apartajn vidpuntojn kaj kvazaŭ unu sola homo kuniĝos por ke vi ne povu vin altrudi ĉe ilia sankta ideo, kaj tiel ili faros la plej belan propagandon por grandigi la hispanan esperantan armeon, ĉar iliaj pioniroj interkonsentis sin fakte instrui por ke la homoj marŝu ĉiam antaŭen mano en mano anoncanta tra la mondo la neceson lerni Esperanton, kies interna ideo estas ame kunigi la homaron per ĉi tiu internacia idiomato, nova sento kiu malaperigante la homajn pasiojn atingos sufoki la kruelan militon ĉefa afero malamata de ĉiu pensema homo.

La malamiko bruante foriris, kaj kiel revo mi aŭdis la eĥon de ĝia voĉo esprimanta la certecon ke se ni tion faras nepre ni venkos.

Villanueva de las Minas.

A. MÁRMOL.

NOVA GRAVA LERNOLIBRO

S-ro Rafael Inglada, filo de nia kunsocietano S-ro Vicente Inglada, ĵus aperigis esperantan verkon titolitan «El Esperanto en 20 lecciones». La nomo Inglada, sufiĉe konata en la esperanta mondo inter la unuaj esperantaj verkistoj, diras ja, multe pli ol ni povus diri per bonsonoraj kaj laŭdantaj vortoj.

La verko enhavas entute 112 paĝojn, sed la teksto estas presita tiel dense, profitante tiel lerte la spacojn, ke ĝi egalvaloras alian havantan pli ol 200 paĝojn.

La gramatiko konsistas el 20 lecionoj, per kiuj estas sufiĉe klarigitaj plej simple kaj praktike ĉiuj reguloj kaj afiksoj Tre longaj ekzercoj post ĉiu leciono enhavas multajn, plej zorge faritajn frazojn. La lasta leciono pritraktas la versofaradon kaj la teknikajn afiksojn. Poste venas longa serio da ekzercoj de aplikado. La tria parto estas la hispana traduko de ĉiuj ekzercoj de la lecionoj.

La prezo estas 2,50 ptj.; por la fratecantoj, kaj esperantistoj kiuj mendos ekzemplerojn per «Frateco» oni faros rabaton.

En la venonta numero ni publikigos kelkajn pecojn de tiu verko.

SCIIGOJ

«Frateco» Esperanta Societo esprimas per NIA Vivo al ĉiuj siaj anoj kaj al ĉiuj esperantistoj de la mondo, sian plej koran deziron ke la nova Jaro 1932.^a estu feliĉega.

Ni ricevus de s-ro Alexander el Praha (Ĉeĥoslovakujo) p.kn per kiu li gratulas nin, pro la apero de NIA Vivo kaj deziras al ni plenan sukceson kaj longan vivon al nia gazeto. Ni kore dankas al tiu s-ro pro siaj entuziasmaj vortoj.

Ni surprizos niajn kunsocietanojn per nova agado kiun Frateco aranĝos baldaŭ, cele nin perfektigi en bonstila verkado de nia dua lingvo. Ni volas kontribui tiom kiom ni povos por krei en nia lando bonajn esperantistojn.

Laŭ la 6^a artikolo de nia Regularo, okazos ĝenerala kunsido la dimanĉon 10^{an} de Januaro de 1932, je la 11^a horo en «Sindicato de Iniciativa», Placo Sas, en kiu oni pritraktos, laŭ decido de la pasinta ĝenerala kunsido, pri la aliformiĝo de nia Regularo. Oni petegas al ĉiuj, bonvolu fari sugestojn pri tiu afero, al la Direktanta Komitato.

Ankaŭ estos elektataj por 1932-33 la sekvantaj postenoj: Vicprezidanto, Vicsekretario, Vickasisto, Vickalkulisto kaj la 2^a kaj la 4^a voĉdonantoj. Ni opinias, ke por tiuj postenoj estos proponataj personoj cele ke en la Direktanta Komitato estu reprezentataj ĉiaj sociaj klasoj kaj opinioj, kiel ni ĉiujare faras.